

LA ESTONTO DE LA BICIKLO EKOS EN NEDERLANDO

***SLOWLANE* : DAŬREBLA BICIKLOPADO IOM SIMILA AL 'GREENWAY' (VERDA VOJO) POR FUTURECE ORIENTATA BICIKLADO.**

Nederlanda estas la sola lando en la mondo kun *bicikla ambasadejo* (Dutch Cycling Embassy) kun la funkcio konsili aliajn landojn pri la plej bonaj ekzemploj de bicikla politiko. En la kadro de ampleksa disvolviĝoprojekto (Brainport Avenue) kiu ligu la verdajn naturejojn en la urboregiono Eindhoven, unu el la plej gravaj scioregionoj en Eŭropo, ekestos ekde 2014 kaj dum postaj jaroj novspeca biciklopado kiu nomiĝas '*Slowlane*' kies karakterizoj estas i.a. jenaj :

- 32 km longa en kolorita asfalto,
- ĉefe ennoviga (energiŝpariga lumigado, informpaneloj ne nur kun destinoj, sed ankaŭ kun elektronika pluvoprediktado),
- dudirekta, kvar metroj larĝa, kreante eblecojn por pli larĝaj veturiloj kiel *flow**, *whike**, *velomobilo** kaj *solarbike* (sunbiciklo),
- maksimuma rapideco de 30km/h malgraŭ ke vetureblas 50km/h per tiaj futurecaj 'bicikloj',
- plej eble sendependa trako disde la alia trafiko kaj do sen malsana aero,
- plejeble multe 'senkonflikta', ĉar sen vojkruciĝoj kun trafiklumoj kaj do trafiksekura (50% malpli da trafikmortintoj).

Slowlane interligas plej ekologie la terenojn de pintaj ennovigaj entreprenoj kaj universitataj kampusoj per la plej mallonga vojo. Ĉar ennovigo okazas nuntempe ofte pere de interŝanĝoj ekstere de la propraj muroj sed en proksimeco, *Slowlane* celas faciligi tiujn interŝanĝojn. *Slowlane* estas angla por 'malrapida vojo' kiu kuros tra bela naturo kaj do sekve de tio kombinos verdaĵojn kaj eblecojn por distri kaj moviĝi survoje de ies hejmo al la laborejo, aspekto kiu montriĝis grava allogilo por la personaro de scioentreprenoj ! *Slowlane* ne formos la solan, sed tamen gravan eron en la kreado de altgrade verda vivmedio kaj tial *Slowlane* estos daŭrebla biciklopado kie ne la aŭto estas bonvena, sed ja la biciklo kaj aliaj homfortobazitaj veturiloj kiel *kuŝbiciklo*, '*bakfiets**', *biciklomobilo** aŭ eventuale *pedeleko**, pedalante nepoluige kun elektra subteno.

Alta vivkvalito kaj altvalora publika spaco fariĝos grava elektofaktoroj por loĝloko



(Foto : Brainport Avenue)

Plia legado : [Handboek Slowlane.pdf](#) - **ATENTU** - 811,87 MB (nederlande)

Fontoj : Brainport Avenue + ‘Fietsverkeer’, 28 27 marto 2011, eld. [Fietsberaad](#)

Glosoj :

Bakfiets : *trirada transportbiciklo kiu havas keston sur la antaŭa rado, plejofte uzata fare de gepatroj ĉar en ĝi ankaŭ povas sidi infanetojn.*



Fietsberaad : *depost tri jaroj Fietsberaad internacie organizas aktivecojn por fari la nederlandan biciklan scion kaj sperton alirebla por fakuloj eksterlande. Kelkaj ekzemploj: la retejo estas parte plurlingva, tri fojojn jare aperas anglalingva elektronika novaĵletero, granda nombro de artikoloj estis tradukitaj en la anglan kaj en kunlaboro kun la ministerio aperis la brila libro ‘Cycling in the Netherlands’ (Biciklante en Nederlando).*



Flow : *jen futureca prototipo*

Kuŝbiciklo : *Kuŝbiciklo estas biciklo kiun oni uzas sidante kaj kuŝante la dorson ĝi estas pli komforta por la dorso.*

Pedeleko (angle *Pedelec* estas kofrovorto por *Pedal Electric Cycle*) : biciklo kun elektra pedalada subteno, kontraste al elektra biciklo (e-bike) per kiu eblas plumoviĝi senpedalente.

Biciklomobilo : triciklo en kiu oni pedalas kuŝinte.

Whike ('veciklo') : triciklo kun ventovelo.